


LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Gironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

ĈU MALAMIKO?

Mia frato Paŭlo jam mortis en la terura franc-germana milito. Johano devis sin kaŝi kaj lia vivo estis en danĝero, ĉar li intencis defendi nin. Mia patro estis preskaŭ mortpafita de la malamikoj, kiam li serĉis Paŭlon, kaj nur pro la petegoj de mia patrino li liberiĝis.

Fine la nombro da malamikaj trupoj, okupanta la urbon, iĝis pli malgranda. Iomete ni respiris. La vundito estis ankoraŭ ĉe ni. Oni forgesis lin, aŭ eble alie ne estis loko por li. Ŝajnis, ke lia estado ĉe ni nin ŝirmis kontraŭ ankoraŭ pli terura, pli kruda agmaniero. La patrino lin flegis, parte pro dankemo, sed precipe pro kompato. Mi ĉiam kuniris, kiam ŝi iris al li, ne pro intereso, sed pro timo antaŭ la soleco, kiu ŝajnis al mi danĝeroplena. Mi kaŝis min post ŝi por ne vidi la viron en la lito kaj ne esti vidata de li. Sed ne ĉiam mi povis kaŝi min tiel bone, ke li foje ne vidus min. Tiam lia rigardo restis sur mi, kaj ne forlasis min. Ne kolere aŭ minace li rigardis; ne, pli multe dolĉe kaj karese. Mi timis la viron, ĉar **malamiko** li estis.

Per tre malforta voĉo li interŝanĝis kelkajn frazojn kun mia patrino; kaj dank' al la kelkaj vortoj, kiujn ili sciis de la alia lingvo, ili sufiĉe interkomprenis. La patrino estis tre bona por li. Kaj iun matenon, kiam li rigardis al mi ankoraŭ pli malĝoje ol antaŭe, ŝi diris, ke mi iru al lia lito. Mi ne volis, mi kontraŭstaris, sed la patrino puŝis min antaŭen.

Tiam li aperigis sian brakon de sub la litkovriloj, kaj ripetite karesis min per la febromalvarma mano sur miaj haroj. De la kapo

ĝis la piedoj mi tremis, sed la patrino firme tenis min. Aperis pala rideto sur lia vizaĝo kaj subite kelkaj grandaj larmoj ruliĝis trans la vakspala vizaĝo en la blondan barbon.



Tiu ĉi sceno min profunde tuŝis. Ree en nia ĉambro la patrino diris, ke mi estonte estu afabla kaj bonvola al tiu ĉi viro. Sed mi

ribelis kontraŭ ĉi tio: „Ĉu afabla al li? Sed li estas al mi tre mal-simpatia! Li estas malamiko! Li venis, por fari al ni malbonon!”

„Ne,” diris la patrino, „tiel ne estas. Lia lando kaj la nia inter-militas, tio estas vera. Li faris sian soldatan devon, kiel niaj viroj la sian. En la batalo oni devas mortigi, por ke oni ne estu mortigata Sed li ne malamas nin. Kaj li estas tre vundita, li ne plu povus batali, eĉ se li dezirus. Li estas tre kompatinda, Henri. Hejme, tre malproksime de ĉi tie li havas fileton, samaĝa kiel vi; li amas tiun knabon, kiel ni amas vin, kaj la infano amas lin, kiel vi nin. Li diras, ke vi similas al lia fileto, kaj vidante vin, estas al li, kvazaŭ li vidas la fileton.”

Sed mi estis obstina kaj diris: „Mi ege malŝatas tiujn malamikojn.”

„Vi kondutas malbone, Henri,” diris la patrino malĝoje.

Tiam mi silentis. Mi ŝajnis min malmola, sed vere mi estis pli tuŝita ol mi montris. La sorto de la malgranda knabo, tie malproksime, kiu tutsola atendis sian patron, malsana kuŝanta ĉi tie, — tio vere ĉagrenis min Se mia patro estus iom pli juna kaj devus kunmarŝi, se **li** estus malsana en la malamika lando kaj **mi** elrigardus al li? Ĉu amiko, ĉu malamiko, ĉu tiuj homoj ne amis kiel ni? Ĉu ne pro la sama kaŭzo kiel ni ili militis, pro **devigo**, nur ĉar oni ordonis al ili? Ho, mi komencis pripensi kaj klarigi al mi kelkajn aferojn!

Dum la tuta vespero mi kuŝis meditante, ĝis kiam mi ekdormis. Matene mi iris pentoplana al mia patrino: „Patrino, mi estos afabla al la malsanulo.”

„Tro malfrue, infano mia. Li foriris.”

„Foriris? Ĉu al sia filo?”

„Ho ve, infano, lia filo ne plu lin vidos!”

„Neniam?”

„Neniam.”

For! Li estis for, kiel mia frato Paŭlo Kaj mi diras al vi, ke mi pro tio havis multan ĉagrenon. Poste mi ofte pensis pri tiu fremda knabeto, kaj neniam sen profunda malĝojo. Li estis „malamiko”, ho jes! Kaj tamen mi amis lin. Mi amis lin, ne konante, ĉar mi multe kompatis lin.

El la holanda: VANE.

Militspirito kaj patriota egoismo estas la neado de ĉia justeco.

LA GIGANTO EGOISTA.

Ĉiuposttagmeze, veninte el la lernejo, la infanoj ludis en la ĝardeno de la giganto.

Estis granda, soleca ĝardeno, kovrita de dolĉa verdaĵo, belaj floroj brilis kiel steloj kaj ĉiuprintempe dekdu persikarboj kovris sin per belkoloraj manteloj kaj donis en la aŭtuno grandajn fruktojn.

Birdetoj saltis sur la arboj kaj kantis tiel delikate, ke ofte la infanoj interrompis sian ludon por aŭskulti ilin.

„Kiel feliĉaj ni estas tie ĉi!” ili ripetis unu al alia. Iun tagon revenis la giganto. Li vizitis unu el siaj amikoj, ĉe kiu li restis sep jarojn. Kiam la sep jaroj forpasis, li revenis al sia kastelo.

Tuj li vidis la infanojn amuzi sin en la ĝardeno. „Kion vi faras ĉi tie?” li ekkriis akrevoĉe. La infanoj forkuris.

„La ĝardeno estas de mi sola. Ĉiu devas konvinkiĝi pri tio kaj neniam mi permesos al iu ajn eniri ĝin”.

Tieldirinte, li ĉirkaŭigis la ĝardenon per alta muro, sur kiun li metis la surskribon:

„Estas malpermesite eniri ĉi tiun ĝardenon. Malobeulojn ni punos.”

Li estis giganto egoista.

La infanoj nun ne plu havis lokon por distri sin: ili klopodis ludi sur la vojo, sed la vojo estis tro polva kaj plena de ŝtonoj .

Post la fino de la lecionoj ili kutime venis al la muro kaj parolis pri la bela ĝardeno. „Kiel agrable ni povus ludi tie”, ili ĝemis.

Alvenis la printempo kaj ĉie ekfloris floretoj kaj ekkantis birdetoj. Nur en la ĝardeno de la giganto daŭradis la vintro. La birdoj ne kuraĝis kantadi, tial ke la infanoj forrestis kaj la arboj forgesis ekflori.

Iun tagon bela floro levis sian kapon, sed vidante la surskribon kaj pensante pri la infanoj, ĝi tiom malĝojiĝis, ke ĝi refalis en la teron kaj ekdormis denove.

Nur la neĝo kaj la glacio amuzis sin.

„La printempo forgesis ĉi tiun ĝardenon!” ili kriis. „Ni do vivos la tutan jaron”. La neĝo sternis sur la herbon grandan blankan litotukon; la glacio vestis la arbojn per arĝenteca vestaĵo kaj ili invitis la nordan venton.

La vento akceptis kaj venis, kovrita per pelto, muĝanta kaj renversanta kamentubojn.

„Estas belega loko tie ĉi”, ili diris. „Ni invitu la hajlon”. Kaj

ankaŭ la hajlo venis, grize vestita; batadis kaj tamburaĉis ĉiutage tri horojn sur la tegmento de la kastelo, detruis multajn tegolojn kaj poste tumultis en la ĝardeno. Ĝia spirblovo estis frosto.

„Mi ne povas kompreni, kial la printempo tiom malfrue alvenas” diris la giganto ĉiufoje kiam li staris antaŭ la fenestro por rigardi sian ĝardenon, blankan kaj malvarman. „Mi esperas, ke la tempo baldaŭ ŝanĝiĝos”.

Tamen la printempo ne venis kaj ankoraŭ malpli la somero. En ĉiujn ĝardenojn la aŭtuno portis orajn fruktojn, escepte en la ĝardenon de la giganto. „Li estas tro egoista”, ĝi diris.

En lia ĝardeno ĉiam restis la vintro kaj daŭre li vidis dancadi inter la arboj la nordan venton, la hajlon, la glacian kaj la neĝon.

Iun matenon, jam vekiĝinta, tamen ankoraŭ en sia lito, la giganto aŭdis dolĉan muzikon. Antaŭ lia fenestro kantis fringeto. Ankaŭ la hajlo ĉesis dancadi sur lia tegmento kaj la nordan venton li ne plu aŭdis muĝi. Delikata parfumo atingis lin tra la malfermita fenestro.

„Fine venos la printempo” li ekkriis kaj tra la fenestro li vidis strangan fenomenon.

Tra breĉo en la muro la infanoj eniris lian ĝardenon kaj grimpis sur la branĉojn de la arboj. Sur ĉiu planto sidis infaneto, kaj la plantoj, feliĉaj pro tio, spontane kovris sin per floroj kaj kun danko movis la brakojn super tiuj malgrandaj kapoj. Birdetoj gaje flugis kaj kantis, la floroj ridante levis la kapojn super la herbo.

Sole en unu angulo de la ĝardeno estis ankoraŭ la vintro, nome en la plej malproksima angulo, kaj tie malgranda infano, tro malgranda por grimpi sur la branĉojn de arbo, amare plorante, ĉirkaŭiris ĝin. La malfeliĉa arbo estis ankoraŭ tute kovrita de glacio kaj de neĝo kaj la norda vento blovis super ĝi. „Saltu infano”, diris la arbo, kiu mallevis siajn branĉojn al ĝi, sed la infano estis tro malgranda. La koro de la giganto moliĝis.

„Kiom egoista mi estis”, li pensis. „Nun mi scias, kial la printempo ne volis veni ĉi tien. Mi metos la etulon sur la pinton de la arbo, poste mi malkonstruos la muron kaj tiel mia ĝardeno estos por ĉiam la tera paradizo por la infanoj.”

Pentoplena pro tio, kion li ĝis nun faris, li malsupreniris la ŝtuparon, malfermis senbrue la pordon kaj eniris sian ĝardenon. Kiam la infanoj vidis lin, ili tuj fuĝis kaj en la ĝardenon samtempe la vintro revenis. Nur la malgranda infano ne forkuris, ĉar pro la plenlarmaj okuloj ĝi ne vidis la giganton. Stelire la giganto venis mal-

antaŭ ĝin, prenis ĝin amplene sur la brako kaj metis ĝin sur la arbon. La arbo subite ekfloris kaj birdetoj kantante eksidis sur la branĉojn kaj la danka infano ĵetis la braketojn ĉirkaŭ la kolon de la giganto. La aliaj infanoj, vidantaj ke la giganto ne estas malbona, revenis kaj kun ili revenis la printempo.

„La ĝardeno nun estas al vi, miaj infanoj”, diris la giganto, kiu prenis grandan pioĉon por forrompi la muron.

La homoj, kiuj tagmeze iris al la foiro, vidis la giganton, ludanta kun la infanoj en la belega ĝardeno. La infanoj ludis la tutan tagon kaj vespere ili venis al la giganto por diri adiaŭ al li.

„Sed kie estas via malgranda kamaradeto, la infano, kiun mi metis sur arbon hodiaŭmatene?”

„Ni ne scias”, respondis la infanoj, ĉu li foriris.....”

„Diru al li, ke li morgaŭmatene revenu”.

Tamen la infanoj diris, ke ili ne scias, kie li loĝas kaj ke ili neniam antaŭe vidis lin. La giganto malĝojiĝis pro tio.

Ĉiuposttagmeze post lernejhoroj la infanoj venis ludi, sed la etulo, kiun la giganto tiom amis, ne plu revenis.

„Kiomulte mi donus por revidi lin!” kutime diris la giganto.

La jaroj forpasis, la giganto maljuniĝis kaj tiom malfortiĝis, ke li ne plu povis partopreni la ludadon; li sidadis en granda apogseĝo kaj rigardis la petoladon de la gajuletaro kaj admiris sian belan ĝardenon.

„Mi havas multajn belajn florojn, sed miaj plej belaj floroj estas la infanoj”. Iun matenon, dum la vintro, vestante sin, li iris al la fenestro. Li tiam ne plu malŝatis la vintron, ĉar li sciis, ke la printempo dormas kaj la floroj nur ripozas.

Subite li frotis la okulojn kaj rigardis atente. Estis certe mirinda spektaklo. En la ekstrema angulo de lia ĝardeno sin levis arbo kovrita de graciaj blankaj floroj, kun orumitaj branĉoj, kiuj portis arĝentajn fruktojn kaj sub la arbo staris la malgranda infano.

Rapidege, preskaŭ freneza pro ĝojo, la giganto malsupreniris la ŝtuparon, kuregis tra la ĝardeno, proksimiĝis al la infano kaj ruĝiĝis pro kolero.

„Kiu kuraĝis vundi vin”, li ekkriis.

Sur la manplatoj de la infano li vidis la signon de du najloj kaj saman signon li vidis sur la piedetoj de la etulo.

„Kiu kuraĝis vundi vin?” ripetis la giganto. „Diru al mi, kaj mi prenos fosilon kaj mortigos lin”.

„Ne”, respondis la infano. „Min vundis la amo”.

„Kion?” kriis la giganto.

Respekta timo ekkaptis lin kaj li klinis sin antaŭ la malgranda estaĵo. La infano ridetis. „Vi lasis ludi min unu fojon en via ĝardeno; hodiaŭ vi eniris mian Paradizon”.

Tiuposttagmeze la infanoj trovis la giganton kuŝanta sub arbo. Li estis morta, tute kovrita de blankaj floroj.

Trad. PIKILO.

IMPERIESTRO KARLO KAJ LA ABATEJO SEN ZORGOJ.

Rondvojaĝo de imperiestro Karlo en Flandrujo, iutage kondukis lian moŝton al abatejo, kies pordeto montris la surskribon: „Ĉi tie oni vivas sen zorgoj.”

— „Ĉu ebla”, pensis la regnestro, kiu apenaŭ kredis siajn okulojn. Ĉu ekzistas iu sur la tero, kiu povas vivi tute senzorge? Mi ĉiutage devas cerbumadi, senzorga mia kapo neniam estas kaj, en jena abatejo, la vivo estus sen ia nubeto? Ekstera ŝajno, mensoga logilo” li konkludis.

Li vokigis la abaton, kiu tute konfuzita aperis antaŭ la altranga vojaĝanto. La imperiestro esprimis sian miron kaj postulis klarigojn pri la senzorga vivo en la abatejo.

La abato tute trankviliĝis, kiam li eksciis la kaŭzon de la imperiestra scivolemo, kaj, kun serena vizaĝo, li ridetante respondis: „Imperiestra moŝto, pli simpla afero ja ne ekzistas: ni manĝas, trinkas kaj dormas, kaj pri la cetero zorgas la Sinjoro.”

— „Nu, estimata abato, tio ne plu povas daŭri kaj, por ke vi ankaŭ foje havu zorgojn, mi postulas de vi respondon al jenaj tri demandoj. Unue: kiom profunda estas la maro? — Due: kiom da bovinvoŝtojn oni bezonas por mezuri la distancon de via abatejo al la suno? — Trie: Kion mi opinias? — Morgaŭ je tagmezo mi ĉi tie atendos viajn respondojn.”

Kun sulkoplerna frunto, malgaja mieno kaj klinita kapo la abato malrapide paŝis al la abatejo. For estis lia senzorgeco, ĉar, ju pli li klopodis trovi la respondojn, des pli li konvinkiĝis, ke li neniam sukcesos solvi tiujn problemojn. Finfine li decidis peti konsilon al la muelisto, kiu estis konata kiel tre ruza viro.

— „Ĉu pro tiaj bagateloj vi maltrankviliĝas?” kompatis la muelisto. „Mi ordigos tiun aferon kun Kaĉjo!” Kaj la postan tagon li surmetis la abatan robon kaj tiel alivestita li aperis antaŭ la potenca regnestro.

— „Nu, kara abato, ĉu vi trovis la respondojn?” severmiene lin alparolis la imperiestro.

— „Jes, certe, via moŝto.”

— „Mi aŭskultas.”

— „Via imperiestra moŝto, la maro estas unu ŝtonĵeto profunda. Por mezuri la distancon de mia abatejo al la suno oni nur bezonas unu bovinvoŝton, kondiĉe ke ĝi estu sufiĉe longa. Kaj vi opinias, ke antaŭ vi staras la abato, sed estas la muelisto.”

Aŭdinte tiujn spritajn respondojn, la imperiestro tutkore ekridis kaj se li ne ĉesis, li ankoraŭ ridegas nuntempe.

Rerakontis: E. CORTVRIENDT.

ANTAŬ KELKAJ TAGOJ MORTIS HEROINO.....

Karaj legantoj!

Certe la rakonto „En la Lumturo” (en la aŭgusta numero) interesis vin multe. Sed post la legado vi pensis: „Jes, interese, sed estas nur rakonto!”

Bonvolu legi la jenon. Ĝi estas vera okazintaĵo.

(El la franca ĵurnalo „Populaire”)

Lorient (Francujo) la 19an de Aŭg.

Jus mortis sinjorino Matelot, kiu estis 70-jara. Antaŭ 25 jaroj ŝia nomo estis tre famkonata kaj tiutempe ĉiulandaj ĵurnaloj rakontis kun multe da emocio la heroan agon de tiu virino.

En la jaro 1910-a iun nokton lumtur-gardisto Alexandro Matelot falas de la ŝtuparo en la lumturo kaj svenas. Momenton poste sinjorino Matelot rimarkas, ke la lumo ankoraŭ ne brilas kaj, ke la lanternego ne turniĝas. Ŝi volas scii, pro kio. Tuj poste ŝi trovas sur la ŝtuparo sian svenintan edzon. Ŝi portas lin sur lian liton.

Sed rapide eknoktiĝas, kaj ekstere ŝtormas. Kaj ankoraŭ neniu eklumigis la lampon. La virino subite pensas pri katastrofoj, kiuj povus okazi pro la ne-funkciado de la lanterno.

Ŝi supreniras, plenigas la lanternon kaj lumigas ĝin. Sed ĝi devas turniĝi. Por tio servas iu meĥanismo, kiun ŝi ne povas funkciigi, ĉar la ŝlosilo estas netrovebla. Nun ŝi vokas siajn infanojn, du knabojn ankoraŭ ne 10-jaraj, kaj montras al ili, kiel ili turnu la lanternon. Tio estas fakte tro malfacila laboro por du infanoj, sed devas okazi.

La vento furioze blovas, la ondegoj terure muĝas! Malgraŭ tio la infanoj turnas la aparaton.

Dume sinjorino Matelot, kiu malsupreniris, flegas sian edzon.

Ve! Ĉirkaŭ noktomezo la malfeliĉulo mortas. Al li la okulojn ŝi fermas, la manojn ŝi kunigas. Plenuminte tiun taskon, plendolora ŝi denove pene supreniras la krutan ŝtonŝtuparon.

Malespera pro ĉagreno, ŝi havas tamen sufiĉe da forto por turni la lanternegon dum la tuta nokto! Ŝi ne volas, ke la morto de ŝia edzo okazigu la morton de aliaj homoj, kiuj tranoktas sur la maro.

* * *

Ŝi ricevis la premion de Carnegie.

Bravulino estis tiu humila virino Brava ŝi estis nur pro humanismo!

Villeveyrac, Francujo.


Esperantigis: LENTAIGNE.

SOLVOJ EL NO. 3.

1. Ĉarmo — marĉo; porko — korpo; krabo — brako; karbo — barko; dento — tendo; frago — grafo; palto — talpo; torso — sorto.

2. Amsterdam — Esperanto — Mensogulo.

Jen la nomoj de la premi-gajnintoj: S.ino N.H. Luyting-Vos van Zon, Zd. Scharwoude, Nederlando; S.ro A. Onttonen, Petäjärvi, Finnlando; S.ro Sachse, Klagenfurt, Aŭstrujo; S.ro Fabrie, Rotterdam, Nederlando.



NOVAJ ENIGMOJ.

e, e, e, i, i, l, l, n, o, o, o, o, o, o, o, o, o, p, p, r, r, s, s, u, ŭ.

1. Mondparto. 2. Verbo. 3. Grasa fluidaĵo. 4. Homo, kiu sekrete observas ies farojn.

Riga, Latvujo.

B. REICHBERG.

2. Kio estas la diferenco inter malvarmumo kaj mono?

3. Mi estas parto de la vizaĝo; kun **v** mi estas ornamo; kun **g** mi estas ŝtofo; kun **b** mi estas alia vorto por fundamento,

Inter la sendintoj de la ĝustaj solvoj ni disdonos 4 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la unua de Januaro '36.

LA DUDEK NAŬA LECIONO.

A. La dancanta urso.

Oni instruis al urso dum la juna aĝo la dancarton.

Kiam la besto jam estis granda kaj forta, ĝi **fuĝis** en la arbaron al la kunuloj. Ĝoje ili salutis ĝin kaj la urso rakontis al la gekamaradoj pri la **aventuroj** ĉe la homoj. Fine ĝi **prezentis delikatan** dancan. La ursoj el la tuta arbaro alvenis por **admiri** la **lertan** kunulon. Pro tio nia danc-urso fieriĝis kaj ĉiu-okaze montris la danc-arton por rikolti admiron kaj **laŭdon**.

Sed post kelkaj tagoj la artisto ne plu interesis la brunulojn. Ĝi **penis**, sed nur **tedis** la aliajn. Kaj ĉar multaj enviis ĝin, ili diris: „Ĝi estas **falsa** urso. Vera urso ne dancas!” Kaj oni **mokis** ĝin kiel arlekenon. Fine oni **forpelis** ĝin.

Schattendorff, Aŭstrujo.

WIESBÖCK.

B. Dancanta urso = urso, kiu dancas; ludantaj infanoj = infanoj, kiuj ludas; parolanta filmo, promenantaj homoj, kantantaj knabinoj, ridantaj buboj, bolanta akvo, mangantaj homoj, bojantaj hundoj, disputantaj najbarinoj.

C. Kie estas la ursoj? La ursoj estas en la arbaro.

Kien fuĝis la ursoj? La ursoj fuĝis en la arbaron.

Kie kuras la muso? La muso kuras sub la **divano**. Kien kuras la muso? La muso kuras sub la **divanon**. Kie promenas la patro? La patro promenas en la ĝardeno. Kien promenas la patro? La patro promenas en la ĝardenon. Kie vi estas? Mi estas en la domo.

Kien vi iras? Mi iras en la domon.

Mastrino: „Ĉu vi balais la polvon sub la tapiŝo?”

Servistino: „Kompreneble, mi balais ĝin sub la tapiŝon.

D. Uzu en frazoj: En la ĉamb**ron**, en la ĉambro; en la kort**on**, en la korto; en la loĝe**jon**, en la loĝejo; sur la tabl**on**, sur la tablo; sur la teler**on**, sur la telero.

I. Lerne bone la novajn vortojn en A, B, C, D.

II. Traduku A, B, C, en vian gepatran lingvon.

III. Lerne parkere la rakonton pri „La dancanta urso”.

IV. Respondu al jenaj demandoj:

Kion oni instruis al la urso? Kiam ĝi lernis la danc-arton? Kien fuĝis la urso? Kiam ĝi fuĝis? Kiuj estis en la arbaro? Kiel ili

salutis la urson? Pri kio rakontis la urso? Kion ĝi fine faris? Kiu alvenis? Por kio ili alvenis? Kia fariĝis la urso? Por kio ĝi ĉiam montris la danc-arton? Ĉu la admiro kaj laŭdo daŭris? Kio okazis post kelkaj tagoj? Kiu enviis la urson? Kion ili diris? Kiel ili mokis ĝin? Kio okazis fine?

LA TRIDEKA LECIONO.

A. Aŭstria Rakonto.

Foje Stegbaŭer bezonis ĉevalon; rapidan ĉevaleton, ne **tro** grandan, ne tro malgrandan, ne tro altan, ne tro malaltan, ne tro **timeman**, ne tro **obstinan**; por rajdi li bezonis ĝin; por **dimanĉo**.

Li ĉiam bone profitis, ŝparis iom da mono, posedas domon kaj kampon; kial li ne permesus al si plezuron kaj ne forrajdus kelkfoje? Tuj li veturis al Linz, al ĉeval-negocisto. Li diras al li: „Mi bezonas ĉevaleton, ne tro grandan, ne tro timeman, ne tro obstinan, por rajdi. Por dimanĉo.”

La vendisto iras en la stalon kaj **elkondukas** tre belan ĉevalon, ne tro grandan, ne tro malgrandan, ne tro timeman, ne tro obstinan, ĉarman ĉevaleton.

„Stegbaŭer, il diras,” tiu ĉi tute **konvenas** por vi. Estas rapida ĉevaleto, ne tro alta, ne tro malalta, ne timema, ne obstina.

Tiun ĉi prenu! Se vi sur-**sel**-iĝos je la oka kaj forrajdos, vi estos je la naŭa en Marchtrenk (malgranda loko, 20 kilometrojn de Linz).

Meditas Stegbaŭer iomete. Poste li diras: „Ne, mi ne prenas ĝin.”

„Nu, vi estus malsaĝa”, respondas la ĉevalvendisto, „se vi ne aĉetus la belan ĉevalon, kiu ja tiom konvenas por vi.”

„Ĉio estas tre bela,” diras la kamparano, „sed kion mi faru je la naŭa en Marchtrenk??”

El „FACILAJ ESPERANTAJ LEGAĴOJ”.

B. Labori — laborema; lerni — lernema; kredi — kredema; mensogema, babilema, drinkema, forgesema, batalema, timema, kolerema, dancema, petolema, dankema, ŝtelema, aŭskultema, manĝema.

I. Lernu bone la novajn vortojn en A kaj B.

II. Traduku A kaj B en vian gepatran lingvon.

III. Legu kelkfoje la „Aŭstria rakonto” kaj rakontu la enhavon en via grupo.

IV. Respondu al jenaj demandoj:

Kiu bezonis ĉevalon? Kian ĉevalon li bezonis? Por kio li bezonis ĝin? Por kiu tago? Kion li ŝparis? Kion li posedis? Kien li veturis? Kion li diris? Kien iris la vendisto? Kion li elkondukis?

Kia estis la ĉevalo? Kion diris la vendisto? Kion faris Stegbauer? Kion li poste diris? Kial li ne aĉetis la ĉevalon?

Faru verkaĵon laŭ unu el jenaj temoj:

1. „La eblo kaj la utilo de Esperanto”. 2. „La vivo en granda urbo.” 3. „Grava tago (epizodo) el mia vivo”. 4. „Kiel mi fariĝis Esperantist(in)o.” 5. „Libera tago en la bela naturo”.

Sendu ĝin antaŭ **la unua de Decembro** al: **Red. „La Juna Vivo”, West-Graafdyk, Nederlando.** Al la du sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni donos 2. premiojn.

LA BIRDOJ EN NIAJ ĜARDENOJ (daŭrigo).

Iun varman posttagmezon, sidante en la ĝardeno, mi subite aŭdis pepadon sur prun-arbo tuj apud mi. Mi rigardis kaj jen, tie sidis flank’ al flanko du junaj paseroj, mallaŭte pepantaj. Ili restis trankvilaj, tute ne timis kiam mi senbrue alproksimiĝis. Estis certe la unuan fojon, ke ili forlasis la neston kaj vidis la mondon, ĉar ili ankoraŭ ne timis la homon.

Subite la spektaklo ŝanĝiĝis! Alflugis la patro kun dika raŭpo en la beko. La birdetoj kun tremantaj flugiloj, laŭte kriante, malfermis la bekojn kiom eble plej larĝe, kaj la virpasero flugis sur la branĉon, kie la idoj sidis. Komence iom hezitante pro mia proksimo, ĝi donis la frandaĵon al la idoj; laŭvice ili ricevis peceton en la beko. Provizore ili estis kontentaj, sed, kiam alflugis post kelkaj minutoj la patrino, ree la bekoj malfermiĝis, kaj la nutraĵo baldaŭ malaperis. Nun evidente, ili estis sataj, ili premis sin firme unu kontraŭ la alia, metis la kapon inter la flugilojn kaj ekdormis.

Mi preskaŭ estis forgesinta ilin, kiam mi aŭdis akran, laŭtan pepadon: Ambaŭ la gepatroj alflugis: la idoj vekigis. Ili malfermis la bekojn, sed nun la gepatroj forflugis kun la nutraĵo, baldaŭ revenis, denove forflugis, kaj estis klare: ili volis devigi la idojn sekvi ilin. La junuloj tamen ne havis kuraĝon kaj restis kie ili estis.

Verŝajne ili pensis: „Vi flugu, vi voku, ni sidas bone ĉi tie.”

La gepatroj kontraŭe pensis: „La suno baldaŭ subiros, niaj idoj ne povas resti tie dumnokte, tiel malbone ŝirmataj”.

Ankaŭ mi havis la saman penson. Mi prenis el la kuirejo antikvan, nederlandan fajrokesteton, metis en ĝin kartonan skatoleton kun lignolano kaj iris en la ĝardenon. Per unu mano mi tre singarde prenis la du birdetojn, kaj metis ilin en la skatoleton. En la sama momento mi ekaŭdis krion de la patrino, tiel akran, timan kriegon, ke mi impulse diris: „Ne timu, trankviliĝu, panjo, mi bone prizorgos viajn idojn; morgaŭ vi revidos ilin.”

La sekvintan matenon la birdetoj sidis ankoraŭ sammaniere. Mi prenis la skatoleton, kovris ĝin per la dua mano, iris ĝardenon kaj lokis la du etulojn sur la saman branĉon, kiel la antaŭan tagon. Apenaŭ mi faris tion, la gepatroj alflugis kaj baldaŭ alportis nutraĵon. La tutan matenon mi povis vidi, kiom da peno havis la gepatroj, antaŭ ol la idoj decidis forlasi la prunarbon. Komence nur de branĉo al branĉo sur la sama arbo, sed fine ili flugis post la gepatroj sur alian arbon kaj fine ili ĉiuj malaperis.

Sekvantan fojon mi rakontos ion pri la paruoj en nia ĝardeno.

Wassenaar, Nederlando.

A. E. S. M.

KORESPONDADRESOJ.

Ĉeĥoslovakujo: M. Vošvrda, Plzen, Lohotinská 78, deziras korespondi kun geamikoj el ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtk. il. kaj gazetojn ilustritajn.

Hispanujo: Deziras korespondi tri junaj knaboj 15-jaraĝaj; Magi Esteve, S.Francisc 82, Terrassa; Marc. A. Boncompté, S.Domenese 26, Terrassa; Emili Plá, Pintor Torras 141, Terrassa (Kat.).

Nederlando: Martino Souverein, Venuslaan 69, Enkhuizen (NH), 20 jara kamarado, deziras korespondi kun socialistaj junularanoj el ĉiuj landoj.

Nederlando: Du fraŭlinoj, 18- kaj 20-jaraj deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Precipe pri sporto kaj muziko. Adreso: D.— kaj C. v. d. Oord, Schermerhorn (NH).

Nederlando: F.ino T. Dekker, West-Grafdijk (NH), 20-jara, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtk. il. Respondo certa.

Nederlando: F.ino E. Oostwoud Wijdenes, Abbekerk A. 103 (NH), deziras korespondi per leteroj kaj poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. Certe respondos.

Nederlando: Kiu volas sendi al mi ilustritan karton pri ventmuelilo de sia lando, rekompence mi sendos muelilkarton de nia akvoriĉa regiono. (nur eksterlande). Adreso: E. v. Walsum, Wijk E. No. 86, Alblaserdam.

Nederlando: S.ro P. Groen, Langezwaag (Fr.), petas alsendon de legitaj esperantaj libroj. Li pagos la portkostojn.

„LA GERMANA ESPERANTISTO (OKT. '35)” PRI „LA JUNA VIVO”:

..... Jam de unu jaro aperadas la plaĉaj kajeroj de ĉi tiu malmultekosta interesa, riĉ-enhava gazeto, destinita por instrui kaj amuzi la internacian lernantaron, unuavice gejunulojn kaj komencantojn. La numeroj aperintaj en la unua jaro estas kunigitaj libroforme en unu proks. 200-paĝa volumo, bele presita sur bona papero. Estas vera plezuro trarigardi, aŭ pli bone atente legadi la multflankan enhavon adaptitan al la bezonoj kaj kapabloj de junularo kaj novaj E.-istoj, Multnombraj desegnaĵoj klarigas la lecionojn kaj ekzerclegaĵojn. Facilkompreneblaj rakontetoj, fabloj, ŝercaĵoj, poemetoj, enigmoj, kantotekstoj kun simplaj muzikaĵoj, infanaj kaj societaj ludoj alternas en malenuiga vico kaj montras, kiel zorge la redaktoro E. v. Veenendaal-Bouwes elektis la kontribuiaĵojn. Do por lerni, instrui kaj ekzerci nian lingvon, „La Juna Vivo” estas dankinda helpilo, kiu meritas, esti subtenata per kiel eble plej multaj abonoj de grupoj kaj opaj lernantoj. Laŭdezire la redakcio sendos senpagajn specimenojn.

V.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

Dum la lasta monato la esperantistaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo”:

Belgujo: Brussel (infankurso).

Portugalujo: Aljustrel.

Nederlando: Kollum; Oud-Karspel (komenckurso); Ede (daŭrigkurso); Veendam (komenckurso); Purmerend (komenckaj daŭrigkurso); Kwadijk (komenckaj daŭrigkurso); Middellie (komenckaj daŭrigkurso); Heiloo (komenckaj daŭrigkurso); Stomporenen (daŭrigkurso); Koedijk (komenckaj daŭrigkurso); Schermerhorn (komenckaj daŭrigkurso); Uitgeest (komenckaj daŭrigkurso).

RICEVITAJ LIBROJ.

„Facilaj Esperantaj Legaĵoj”, kompilitaj de Profesoro G. Waringhien. La libreto (94-paĝa) konsistas el du partoj: unue, kolekto da diversaj distraĵoj; due, ekstraktoj el la verkoj de Zamenhof aŭ de klasikaj stilistoj. Prezo f 0,50. Mendebila ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”.

ATENTU!

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.

ATENTU!!!

Adressŝanĝoj de niaj reprezentantoj:**Svedujo:** John Karlsson, Berga, Västerhaninge.**Japanujo:** S.ro Joshy H. Ishiguro, Daita II-784, Setagaja, Tokio. Poŝt-ĉekkonto: Tokio 62061.**Ĉeĥoslovakujo:** Provizore ne sendu monon al Svoboda, ĉar li estas for de sia hejmo.**FUNDAMENTA KRESTOMATIO**460-paĝa (broŝurita) f 1,50
(kartonbindita) f 2,00**MARTA**E. Orzeszko. Trad. Dr. Zamenhof
237-paĝa. Prezo (sur peza papero)
f 2,20**LA FARAONO**Prus. trad. D.ro K. Bein
Tri volumoj, prezo kune f 3,60**ASPAZIO**A. Svjentoĥovski. D.ro Leono Zamenhof.
Tragedio en kvin aktoj. Prezo: f 0,80**SOKRATO**Ch. Richet. Trad. J. Couteaux.
Triakta dramo. Prezo: f 0,60**VERDAKATA TESTAMENTO**Raymond Schwartz.
Gajaj deklamaĵoj. Prezo: f 1,00**ANNIKAJ MONTMARTRE**Raymond Schwartz.
Originala Romano, 128 paĝa. f 1,20

Eldonitaj de

**ESPERANTISTA CENTRA
LIBREJO**

Mendeblaj ĉe:

Redakcio „La Juna Vivo”
(aldonu 10 % por sendkostoj)**ESPERANTO POR INFANOJ**G. Gladstone Solomon.
Fortike broŝ. f 0,60**FACILA LEGOLIBRO**Red. K. R. C. Sturmer.
Broŝ. f 0,40**JUNECO KAJ AMO**E. S. Payson.
Broŝ. ... f 0,40. bind. ... f 0,80**KOMPATINDA KLEM**John. Merchant.
Broŝ. ... f 0,60. Bind. ... f 1,00**MINIATUROJ. Poemoj**G. D. Nash.
Bind. f 1,00**POR RECENZO**K. R. C. Sturmer.
Broŝ. ... f 0,60. bind. ... f 1,00**PRI LA ORIGINO DE L'HOMO**Sir A. Keith, Trad. Brown kaj
McCormick.
Broŝ. ... f 0,70. Bind. ... f 1,00**ROMANO PRI AFRIKA BIENO**O. Schreiner. Trad. S. A. Andrew.
Broŝ. ... f 1,80. Bind. ... f 2,40**LA VIVO****DE NIA SINJORO JESUO**Charles Dickens. Trad. M. C. Butler
Bele bind. kun multaj ilustraĵoj.
f 2,40

Eldonitaj de

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO,

La redakcio urĝe petas al la eksterlandaj legantoj baldaŭ pagi la jarabonon al la peranto en sia lando. (vidu paĝon 63 de la antaŭa numero, kaj paĝon 79 de la nuna numero).

PAŜO POST PAŜO.

Een volledige Esperanto-leergang
door

J. W. Minke en F. Boom-de Vries

Iste deeltje (150 pag.) f 0,75
2de deeltje (208 pag.) f 0,95

Verschenen bij:

N.V. Uitgevers Mij. van Dishoek

Verkrijgbaar bij de redactie van
„La Juna Vivo”.

**INTERNACIA PEDAGOGIA
REVUO**

Jam aperas dum pli ol 10 jaroj, raportas pri internacia scienca pedagogio, pri kongresoj kaj laboroj de la internaciaj instruistaj asocioj pri ESP. en instruistaro diverslandaj pri lernejo kaj instruistaro peradas interkorespondon por instr. kaj lernantoj, estas organo de TUTMONDA ASOCIO DE GEINSTRUISTOJ ESPERANTISTAJ (TAGE). Jarabono por 6 kajeroj kostas (inkluzive aneco de TAGE): 2,50 nederl. guldenoj.

Abonon kaj artikolojn sendu al la administranto P. KORTE, Schoolstraat 13. VEENDAM. (Nederlandoj).

Ĉu vi interesigas pri Svedlando kaj pri la sveda esperanto-movado? Se jes, nepre abonu la belan, ĉiumonate aperantan

SVEDA ESPERANTO-GAZETO.

Ĉiu numero ampleksas 16 paĝojn en formato 22 × 30 cm. Abonu jam nun por la jaro 1936 ĉe la eldonanto **Eldona Societo Esperanto**, Stockholm 1. Poŝt-ĉeka konto Stocholm n-ro 578.

Katalogo pri esperantaj libroj estas senpaga ricevota per peto ĉe la sama eldonejo.

**LA DECEMBRAJ FESTOJ
ALPROKSIMIGAS,**

Kaj vi ne scias, kion donaci al via geamikoj?

Ĝojigu ilin per la bind. jarkolekto

„LA JUNA VIVO”.

Jen vi havas la plej malkaran kaj praktikan esperantan donacon!
La prezo estas nur: 1,6 Sv. Fr. 0,75 glo

La plej viva, interesa, divers-enhava revuo estas

NIA GAZETO.

Redaktata de profesiaj ĵurnalistoj:

Georges Avril kaj S. Grenkamp.

Ĉiu numero, abunde ilustrita, enhavas ĉirkaŭ 2.500 liniojn de bonstila teksto pri aktualaĵoj, literaturo, scienco, arto, agoj kaj faktoj en la esperanto-movado.

NIA GAZETO

estas la plej malkara el ĉiuj similaj periodaĵoj.

Prezo de l'jarabono: 12 frfk. por landoj aliĝintaj al la Konvencio de Stockholm; 15 frfk. por la aliaj landoj. Provezemplero kontraŭ respond-kuponon de la poŝto.

Adreso: 29 avenue de la Victoire, Nice (Francujo).

Kiu favoras la interplektiĝon de du gravaj internaciaj movadoj (la skolta kaj la esperanta), tiu helpu per abono al „**Skolta Bulteno**”, la kvaronjara gazeto. Senpagan specimenon de: 54, Constable Road, Ipswich, Anglujo.

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan libro-liston!!)